

# KKPS 3 forblovos vin!

## Ne estu koko, venu al KKPS

Post unu KKPS en fortikejo kaj dua en bieno, la tria KKPS okazos ĉe la maro, en la taŭge nomata Kvartalo-ĉe-Marco de la **7-a ĝis la 9-a de novembro**. Kun pli plena programo ol iam ajn antaŭe, pli luksaj ĉambroj (dupersonaj!) aŭ pli grandaj rabatoj (en tendo!), kaj kun speciala oferto, kiun vi ne povos rifuzi.

## Etosopluna programo

Krom la neforgeseblaj programeroj kiel koncertoj, trinkejo kaj urba ludo, tiu ĉi KKPS ofertas riĉan oferton da kursoj por ĉiu nivelo pro kunlaboro kun Esperanto Nederlando, kaj por pli spertaj membroj de NEJ, PEJ, ARCI, TEC, EAS, JEFO kaj EDE okazos trejnseminario pri merkatumado, kun repago de vojaĝ- kaj restadkostoj. Nerifuzebla, ĉu?



## Aliĝu tuj kaj planu vian vojaĝon

Wijk aan Zee troviĝas je 25 km de Amsterdamo, kaj estas plej bone atingebla el la flughaveno Schiphol Amsterdam. Malmultekostaj flugoj iras al Eindhoven, kaj multaj internaciaj trajnoj iras ĝis Amsterdamo. Por aliĝi, plenigu la suban aliĝilon kaj antaŭpagu 20€ dum IJF al Roĉjo aŭ Nico, aŭ aliĝu ĉe <http://kkps-klacxkunveno.wikispaces.com> kaj ĝiru 20€ al nejk-r aŭ NL85RABO0147949424.

Persona nomo: \_\_\_\_\_ Familia nomo: \_\_\_\_\_

Naskiĝdato: \_\_\_\_ - \_\_\_\_ - \_\_\_\_ Sekso: \_\_\_\_\_ Loĝlando: \_\_\_\_\_

Retpoŝtadreso: \_\_\_\_\_

Mi manĝos: ĉion / vegetare / \_\_\_\_\_

Mi dormos: En tendo / en duopa ĉambro (kun: \_\_\_\_\_)

Mi antaŭpagas €20: Per bankĝiro/per uca-konto/kontante al : \_\_\_\_\_

Mi planas partopreni la seminarion kiel membro de NEJ / PEJ / ARCI / TEC / EAS / JEFO / EDE.

Mi volas partopreni esperantan kurson dum KKPS.



# Pos-Amiko

Printempo 2014, Numero 8

## INDEKSO:

1. UEA-membronombro kreskas pro krimea krizo

2. Peto por nova kupon-sistemo en E-aranĝoj

2. AIS malkovras novan tipon de esperantisto

2. Viandmanĝantoj sentas sin diskriminacitaj de E@I

3. El la tombo de Zombenhof

3. Horoskopo

4. EVENTOJ

## KOLOFONO

Pos-Amiko estas eldonaĵo de Nederlanda Esperanto-Junularo kaj aperas kvarfoje en la jaro.

Redaktoro: Koko Poso  
[kkps.klacxkunveno@gmail.com](mailto:kkps.klacxkunveno@gmail.com)

## UEA-membronombro kreskas pro krimea krizo

Ĉiu krizo havas siajn gajnantojn kaj malgajnantojn. Dum la rusaj tankoj atendas ĉe ukrainaj landlimoj, en Roterdamo estas kialo por ĝoji. La centra oficejo raportas, ke ekde marto la asocio havas preskaŭ cent novajn individuajn kaj aligitajn membrojn. Pli detala esploro montras, ke la kresko konzistas preskaŭ sole el enloĝantoj de la duoninsulo Krimeo, kiu estis kaj estas la centro de monda atento pro la rusa invado. Ĉu do la nova registaro alportas favoran politikon al Esperanto? Aŭ ĉu la malnova ĝin subpremis? Ne. Bone informita fonto en la roterdama oficejo klarigas:

*“Je la 16-a de marto la Rusia Esperantista Unio indikis, ke post la aliĝo de Krimeo al la Rusa Federacio ni kalkulu la tie loĝantajn esperantistojn sub Rusio, kaj tiel ni gajnis multajn novajn rusiajn esperantistojn je tiu tago.”*

Poso: *“Sed ĉu ne la samaj esperantistoj malaperis el la ukrainaj statistikoj, tiel nuligante la efikon?”*

*“Ĝuste ne, ĉar je la sama tago venis mesaĝo el Kievo, ke Krimeo estas integra parto de la Ukraina ŝtato, kaj ke ni nepre kalkulu ĉiun krimean esperantiston kiel enloĝanton de Ukrainio. Kiel vera finno mi ŝatas kompromisi por ne ofendi unu aŭ alian flankon, kaj pro tio mi decidis kalkulu ilin en ambaŭ landoj.”*

Aliaj organizoj nun pripensas uzi similajn metodojn por solvi politikajn konfliktojn: TEJO ekzemple kalkulus katalunajn membrojn en KEJ kaj HEJS, kaj eble estonte farus same por skotoj. Unu estrarano per laŭta voĉo komentas: *“kaj la kresko en membronombro estus hazarda sed bonvena kromefiko por nia ekstermovada statuso.”*

## **Peto por nova kupon-sistemo en E-aranĝoj**

Manko da fikado dum E-aranĝoj, aŭ tro da proponoj fare de kripuloj, ofte kreas malkontenton inter la partoprenantoj. Grupo da esperantistoj, kiuj sin nomas la 'Anonimaj Fikemuloj', kredas ke seksa kunumado inter esperantistoj estas bona kaj subteninda afero, kvankam foje oni troigas kaj forgesas eĉ la plej minimumajn regulojn de deca konduto. Sed ili proponas bonan solvon por eviti tion.

En la akceptejoj homoj ne ricevu nur manĝkuponojn, sed ankaŭ fikkuponojn kaj rifuzkuponojn. La organizantoj mem decidu, kiom da kuponoj disdoni al ĉiuj partoprenantoj, kontraŭ la baza kotizo, kaj ĉu lasi la eblecon ricevi kontraŭpage pli altan kvanton da ili.

Ekz. la partoprenantoj ricevu baze po 5 fikkuponojn kaj 5 rifuzkuponojn. Tio signifas, ke ĉiu rajtas provi seksumi kun ne pli ol 5 aliuloj, kaj rifuzi ne pli ol 5 proponojn. Tiam la homoj devos unue interkonatiĝi, kaj bone atenti ne malŝpari siajn eblecojn. Ankaŭ eblas, ke homoj interŝanĝu fik- kaj rifuzkuponojn, ekz. fermita paro disdoni siajn fikkuponojn kaj ricevi interŝanĝe rifuzkuponojn. Perfektigos la sistemon diverskoloraj nomŝildoj laŭ la seksorientiĝo. La Anonimaj Fikemuloj sinturnis al Koko Poso por ellabori finan regularon kaj petis, ke li estu la supera aŭtoritato por kontroli, ke ne okazu misuzo de la kuponoj.

## **AIS malkovras novan tipon de esperantisto**

D-ro S. Piro de la fama Akademio Internacia de la Sciencoj en februaro publikigis esplorrezultojn, kiuj pruvas la ekziston de ĝis nun ne rekonita tipo de esperantisto: la eterna kabeonto. Temas pri malofta tipo, sed ili pli ofte troviĝas inter organizantoj de renkontiĝoj. Oni povas rekoni la eternan kabeonton laŭ tio, ke li aŭ ŝi ĉiam promesas baldaŭ eliri organizon aŭ ne plu organizi aferojn, sed tre malofte la kabeonto plenumas tiun promeson.

## **Viandmanĝantoj sentas sin diskriminaciitaj de E@I**

Post la pasintjara tumulto pro 'kruel-imposto' (vidu Pos-Amikon #4), ĉi-monate E@I denove sukcesis ofendi la duonon de la esperantistaro, kiu manĝas viande. Je la 21-a de marto la mistera slovaka organizo publikigis apetito.ikso.net, retpaĝon kun nur vegetaraj kaj veganaj receptoj. Reage al tio la praga Esperanto-klubo E-Mental, kiu organizas la renkontiĝon VIANDO, decidis lanĉi sian propran retpaĝon. Baldaŭ trovebla ĉe viando.e-mental.cz, ĉiuj receptoj en tiu ĉi retpaĝo estos kuiritaj el nur viandaj ingrediencoj. La komitato de UEA baldaŭ voĉdonos por rezervi centmil eŭrojn por la konstruado de retpaĝoj kun 'neŭtralaj' receptoj. Provizora adreso estos manghemo.uea.org.

TEJO ankaŭ lanĉis retpaĝon [www.nutraservo.org](http://www.nutraservo.org) por junularaj receptoj, kaj BEJO jam kontribuis per konsiloj por eviti gluiĝantan rizon. Bedaŭre jam post du tagoj la retpaĝo paneis, kaj la Civito nun provas logi la uzantojn de Nutra Servo per sia propra projekto [esperantio.net/malsato](http://esperantio.net/malsato). Rilate al ĉi ĉio Muzaiko respondas, ke ili jam antaŭ tri jaroj havis programon pri receptoj (Kuiru kun Petra!), kaj ke mono nun elspezata al tiaj retpaĝoj pli bone irus al subteno de etaj projektoj. Konklude, estas receptoj por ĉies preferoj. Kiel ajn vi kuiras, ne forgesu montri viajn kreaĵojn dum la trinkomanĝa nokto de IJF.

## El la tombo de Zombenhof

Antaŭ kelkaj semajnoj mian okulon trafis arda diskuto en la komputila inter-reto, kiu temis pri tri junaj polaj esperantistinoj, fotitaj kun nenio sur si krom granda verda flago. La diskuto turniĝis al la objektigo de virinoj kaj seksa egaleco. Tio eble al vi junuloj ŝajnas aktuala temo, sed mi atingis aĝon, en kiu mi ĉion jam vidis. En 1906 ekestis en la movado preskaŭ la sama diskuto kiel hodiaŭ, kun nura diferenco, ke tiam la seksaj roloj estis inversaj. La diskuto ekestis pro foto, kies ekzisto poste estis sukcese forgesigita de la grandaj esperantistaj asocioj. Tamen mi havas la originalon, kaj hodiaŭ ĝin republikigas kiel mian kontribuon al la diskuto pri genra egaleco:

*-Lazaro Zombenhof*



## La horoskopoj

**Ŝafo:** Vi havas nenion por fari kaj tial iĝas komitatano.

**Taŭro:** Se vi fuŝos ekzamenojn, vi ja ĉiam povas iĝi verkisto de horoskopoj.

**Ĝemeloj:** Vi malkovros, ke italoj pli laŭtas ol infanoj.

**Kankro:** Vi akcidente ĉeestos dum tuta semajno la malĝustan seminarion.

**Leono:** Mi rekomendas al vi ĉi-foje ne petveturi hejmen.

**Virgulino:** Post la nokta prelego vi ne plu estos.

**Pesilo:** Vi faligos tomatsaŭcon sur la Pos-Amikon pro tio vi ne legas tiun ĉi frazon.

**Skorpio:** Pro bona merkatumado vi decidus aliĝi al la trejnado pri merkatumado.

**Aleks Kadar:** Vi daŭre ne eltrovos, kiu verkas la Pos-Amikon.

**Sagitario:** Pasko estas bona semajno por paŭzigi dieton.

**Kaprikorno:** Ne timu, kantu.

**Akvisto:** Vi pripensas kabei, sed post ebriiĝo tamen decidus plu aktivi.

**Fiŝoj:** Memoru: la ĉefa celo de trinkomanĝa nokto ne estas ebriiĝi.